

**Kluba Programo:****julio:**

- 5 David Thornell: *Usona sendependiĝo*  
(1800h: konsilantaro)
- 12 Teama Skramblo
- 19 Socia Vespero
- 26 Brian Barker: *Lingva justeco*

**aŭgusto:**

- 2 Promeno – renkontiĝo ĝis 19:15 ĉe Hyde Park  
(Speakers' Corner).
- 9 Vladimir Popov *Vojaĝimpresoj de Aviadisto*
- 16 Heleno Fantom: *el la Maniko de nia Librobreto*  
(1800h: konsilantaro)
- 23 Socia Vespero
- 30 John Wells: *Lingva Seminario*

**septembro:**

- 6 Klubanoj: *Kongresaj raportoj*

**Esperanta Kalendaro:**

20-27 julio: 98a Universala Kongreso, Rejkjavik, Islando. [http://uea.org/kongresoj/uk\\_2013.html](http://uea.org/kongresoj/uk_2013.html)  
 28 julio – 4 aŭgusto: 86a Kongreso de SAT, Madrido, Hispanio. [esperanto@nodo50.org](mailto:esperanto@nodo50.org)  
 20 - 23 septembro: Internacia Amikeca Renkontiĝo, Aylesford, Kent. Informilon/aliĝilon petu de Anica Page, [anica\\_page@btinternet.com](mailto:anica_page@btinternet.com), aŭ 01908 564004

**Vojaĝimpresoj de Aviadisto (vidu 9a aŭgusto)**

En 9a aŭgusto vizitos Vladimir Popov, kiu faros prezenton pri siaj spertoj, observante la teron de supre, kaj dum vizitoj al pli ol 40 landoj pere de Esperanto.

Li estas emerita piloto kaj specialisto pri aviadiloj.

**Aliaj anoncoj:**

*Prezentu ĉefprogrameron! Se vi havas taŭgan temon kiu amuzos aŭ informos klubanojn, ne hezitu proponi vin al la program-sekretario.*

*Bv. sendi informon al la bultenisto antaŭ 21a aŭgusto por mencio en la sekva Kluba Bulteno.*

## Loko, horaro kaj aliaj informoj

Ni kunvenas vendredvespere ĉe Londona Irlanda Centro. Antaŭ la ĉefprogramero kaj dum la paŭzo klubanoj kutime amasiĝas en la komforta enirhalo por kaftrinki kaj babilo.

Kutima programo:

18:00 - 19:15 Neformala babilado

19:15 - 20:15 prelego aŭ alia ĉefprogramero

20:15 - 20:45 paŭzo

20:45 - 22:00 forumo, diskuto aŭ daŭrigo de la ĉefprogramero

22:00 fino



Loko: London Irish Centre,  
50-52 Camden Square, NW1 9XB  
(tel: 020-7916 7272)

Metrostacio: Camden Town

Fervojo *London Overground*: Camden Road

Busoj: 29, 253, 274, 31.

Kotizoj: £10 jare; fora membro: £6 jare.

Kluba retejo:

<http://www.phon.ucl.ac.uk/home/wells/lek>

Lokaj grupoj: Kingston: Roy Cliffe 020-8397 5895;

Orientlondono: Roy Simmons 01473-461346

rokeby@globalnet.co.uk; Sudlondono: Gregory Porilo

020-8672 8095 [esperanto-sleg@tiscali.co.uk](mailto:esperanto-sleg@tiscali.co.uk).

Federacioj: Orienta: John Redgwell, 17 Dover Close, Braintree, Essex CM7 5TD; Sudorienta: Kevin Murray, 11 Leybourne Ave, West Byfleet, Surrey KT14 7HB 01932-345779 [yarrump@gmail.com](mailto:yarrump@gmail.com).

Funkciuloj: Honora Prezidanto: Marjorie Boulton; Honoraj Vicprezidantoj: Valerie Atkinson, Husejn Al-Amily;

Konsilantaro: David Thornell (Prezidanto kaj Sekretario), Terry Page (Vicprezidanto), John Wells (Vicprezidanto), Arturo Prent (Kasisto), Anica Page (Registristo), Michael Sims, Antony Rawlinson (Program-sekretario kaj Bultenisto).

Adresoj: David Thornell: Esperanto, c/o London Irish Centre (adreso supre) [lek.sekretario@gmail.com](mailto:lek.sekretario@gmail.com);

Arturo Prent: 7 Walton Garden, Hutton, Brentwood CM13 1EJ [ap\\_esp-lek21@yahoo.co.uk](mailto:ap_esp-lek21@yahoo.co.uk),

Terry kaj Anica Page: 7 Hampton, Gt Holm, Milton Keynes MK8 9EP [terry\\_page@btinternet.com](mailto:terry_page@btinternet.com), [anica\\_page@btinternet.com](mailto:anica_page@btinternet.com),

Antony Rawlinson: 5 Thorpe Crescent E17 5BY [acj.rawlinson@ntlworld.com](mailto:acj.rawlinson@ntlworld.com).

Letero de nia Prezidanto

Karaj Klubanoj:

Nun estas tiu sezono, kiu eltiris homojn for – por ferioj, por kongresumi, por esplorvojaĝoj. Ĉio tio estas ĝojiga, ĉar rezultos rakontoj kaj raportoj poste. Preskaŭ nenio estas tiel instrua, kiel persona kontakto kun alilandanoj kaj ties kulturoj. Ĝuste tial, Esperanto riĉigas kaj plenigas la vivon de la arda adeptoj. Ju pli da internaciaj kunvenoj, des pli da komuna bono. Certe, mi mem antaŭĝuas aŭskulti, kion spertis LEKanoj en diversaj renkontiĝoj tra la mondo ĉi-jare. En sia kosmopolita praktiko, Esperantujo manifestas iom paradoksan sed klaran unuiĝon de samideanoj, kiuj samtempe rekonas kaj celebras sian diversecon. La sekvoj estas pli da toleremo, intimo kaj kompreno.

Ĉiuj el ni scias ĉi-tiajn memevidentaĵojn. Tamen, aŭdi ilin denove (ĉu tekste, ĉu vizaĝ-al-vizaĝe) malhelpas neniu.

Do bonvolu reveni al Londono kun viaj aventuroj kaj regalu viajn LEK-amikojn!

Aliteme, mi menciuj kun alta estimo la demision de nia Vic-Prezidanto, **PROF. JOHN WELLS**, de la Prezidanteco de la Esperanto-Asocio de Britio (EAB). Li gvide kaj klarvide laboris profunde, diligente kaj vaste por la daŭrigo, sekureco kaj disvastigo de la Internacia Lingvo en ĉi tiu lando – analoge al sia impona agado dum la gvidado de la Universala Esperanto-Asocio (UEA) antaŭe. Li meritas multe pli ol dankon de ĉiu LEKano.

**Feliĉan Someron!**

David Thornell

### BEGINNERS' CLASS

The lessons which previously took place at the Club on Friday evenings have been discontinued. Tuition for those wishing to learn Esperanto remains available, however: for details of time and place please contact the Secretary, or visit the London Esperanto Club website at

<http://www.phon.ucl.ac.uk/home/wells/lek>

